

Premio ankaŭ estas prezentata al persono, kies laboron la Ĵurio deziras honorigi kaj rekoni, sed kiu komence ne bezonis monan subtenon.

Ĵurio de la Premio pri Rajto je vivrimedoj

La ricevintoj estas elektataj de internacia ĵuriano. Inter ĝia nuna membraro estas:

- Tani Adams, Koordinanto,
Greenpeace Latin America
- Monika Griefahn, Ministro pri la ĉirkaŭanta medio,
Hannover, Germany
- Birgitta Hambraeus, Membro de la Sveda Parlamento
- Sven Hamrell, Direktoro de la Fondaĵo Dag Hammarskjöld Foundation
- Thor Heyerdahl, Aŭtoro kaj esploranto
- Richard Jolly, Rajtigita plenuma Direktoro,
UNICEF
- Ilona Kickbusch, Vivstiloj kaj sano, WHO Europe
- Vithal Rajan, Dekano de Societo por evoluo,
India
- Albert Tevoedjre, M.P., Prezidanto de la Tutafrika
Centro por sociesploroj
- Margot Wallstrom, estinta Ministro de la Sveda
ministraro

Por pliaj detaloj kontaktu:

Premio pri Rajto je vivrimedoj:

Kerstin Bennett

(Administra Direktoro)

Telefono 08-702 03 40

Dato: La 7^a de Oktobro 1992

Right Livelihood Award:

Kerstin Bennett

(Administrative Director)

Phone 08 - 702 03 40

Andaluzio – el vido de Andaluzo

Emilio Moreno, Cádiz

(trad. R. Hauger)

Enkonduko

Tiu ĉi eseo estas la provo, plivalorigi la famekonatan flamenkon kontraŭe al la popularigo kaj malestimo, kun kiuj ĝi estis pritaksata preskaŭ ĉiam.

La intenco estas, klarigi la flamenkon, tiun kulturan esprimon de la andaluza gento, per la interpretado kiel ĝi ekestis el la origina "*cante jondo*", la pura, nur kantita flamenko. Kontraŭe al tiu profunda *cante jondo* evoluiĝis la *Sevillanas*, la *Tangos* k.a. nur pli malfrue per almeto de ritmaj movoj, instrumentaj transiroj kaj fine simbolaj gestoj kaj danformoj. Ni parolu do de la kvar bazaj elementoj de la flamenko: de la kanto, de la kastanjetoj, de la gitaro kaj de la danco, kiuj ĉiuj estas esprimiloj de ne interŝanĝebla kultura identeco.

Ni volas ankaŭ ekscii la radikojn, el kiuj la flamenko ekiris, radikoj, kiuj troviĝas en la historiaj komencoj de la andaluza gento, kaj kiuj la flamenkon nutras ĝis hodiaŭ. Ni neglektu la kliŝan aspekton de la flamenko kaj emfazu ties

konvenan signifon por Andaluzio kaj la geandaluzoj.

Andaluzio estas tiel maljuna kiel nia historia mondo. Kiam granda parto de Europo estis ankoraŭ kovrita de glacio, longtempe antaŭ ol la Grekoj kaj la Romana Imperio atingis signifojn, jam rolis Andaluzio, au kun la vortoj de la andaluza lirikisto Rafael Alberti: "Dekomence estis Andaluzio !" Certe, la teritorio ankoraŭ ne havis tiun nomon, ĉar tiu estas kreaĵo de la Araboj kaj rilatas al la visigotoj, sed Andaluzio estis jam antaŭe kulturlando.

Cádiz estas la laŭ dokumentoj plej malnova urbo de Europo, kaj la legenda Tartessos, loko de antikva civilizacio, prezentiĝis unu el la plej malnovaj politikaj komunumoj de la Okcidento.

Andaluzio aĝas eble 3000 – 4000 jarojn! – jaroj de pacaj kaj perfortaj invadoj; ĉar Andaluzio estis ĉiam lando de enmigrantoj, lando por popoloj kiuj venis por andaluziĝi, popolo–miksaĵo de keltiberoj, tartessoj, fenicoj, grekoj, romanoj, siroj, berberoj, araboj, judoj, ciganoj kaj de aliaj popoloj, do por homoj kiuj serĉis fekundan landon, tertrezorojn, fiŝriĉaĵojn, laboron au agrablan vivon en bonstato, eĉ azilon kaj homfratan akcepton.

Andaluzio estis ĉiam lando de malfermaj brakoj por ĉiu kiu alvenis: "En Andaluzio ne vivas fremduloj – nia gastamo ne estas nur modo, sed tradicio", tiun mesaĝon postlasas al ni Blas Infante, la patro de la andaluza nacionalismo.

Simboleco de la flamenko

Andaluzio respegulas ĝis en la ĉiutagan vivon la formojn de tri kulturoj, kiuj ĝin stampis en la paso de ĝia historio:

- la individualismo de la araboj,
- la muta ribelo de la ciganoj,
- la afliktita religieco de la judoj.

La historio de Andaluzio estas signita per suferoj. Ĝia folkloro baziĝas sur tristeco, peno kaj doloroj. La andaluzo estas konceptita individualisto. La sentimento andaluza flegas la daŭran deziregon retiriĝi malantaŭ kirason de ĝia elmontrata gajeco; tiel ekestas deca ironio, kaŝita malantaŭ ĝojiga vualo. Kaj dum la plej gaja agado neniam troviĝas iu ĥoro: kantas nur unu kaj dancas nur unu; kontraŭe al aliaj regionoj ĥoralo ne ekzistas. Romano–heroo ĉe Pemán komentas tion, ke li ne komprenus la kantadon de 50 nur por ke ĉiuj kantu la samon.

Ĝis en la andaluzan familian vivon lasas eltroviĝi tiu individualismo, kiu postulas de la membroj oferojn.

La tipa kastila familio, kunigita ĉirkaŭ la forno kun la dommastrino kiel centra garantiantino kaj kun la avo kiel vira simbolo, estiĝis en Andaluzio komunumo el kapricaj, sin mem prezentantaj individuoj.

En la andaluza domo estas la vivanta kaj simbola centro ne la vasta kuirejo kun forno kaj kameno, sed la

interna korto kaj la tegmento—ĝardeno, kio signifas rekta heredaĵo de la virina vivo en la haremo. En la domo ne troviĝas honora loko por patro kaj avo, ĉar la domo andaluza ne estas instalita por la homo, sed por gardi en ĝi la virinecon kiel ian altvaloran parfumon. Florpotoj, oranĝuoj, kaheloj estas oferaĵoj al la femineco kaj signifas omaĝojn al la virineco.

La viro restadas en la stratoj, en viraj cirkuladoj, restoraciaj rondoj kaj en koktelejoj. Verŝajne ne ekzistas alia regiono, en kiu la homo tiom longe restadas en trinkejoj ekster la domo. Kontraue al la viroj la andaluzaj virinoj pli malmulte promenadas en la urbo. Pro tio diras Ortega, ke plaĉas al la andaluzo, kontraue al la kastilo au vasko, elmontri sin al la fremduloj tiagrade, ke la vojaĝanto ricevas en urbo kiel Sevilla la impreson, ke ĉiuj enloĝantoj rolas kiel statistikoj kaj kontribuas ĉe la prezentado de grandioza baleto, kiu portas la titolon "Sevilla".

Andaluzio estas la lando de la troigadoj, de la gestoj, de la memprezentado por ne diri de la afektado, kiu kelkfoje similas al la vana turniĝo de la famekonataj aloj de ventmuelejo.

Andaluzio estas jena inter la hispanaj regionoj, kiu plej multe pretendas stariĝi kontraŭ la kaŝado de la intimeco, kvankam tio, kion oni prezentas, ne estas reala intimeco — ankau tio denove ekzemplo de mem—ironio.

El tiu konglomeraĵo de farado kaj lasado nutras sin la

andaluza kulturo kaj ties plej origina ekspresiono, la "*canto jondo*".

Elementoj de la flamenko

La gitaro

La gitaro estas unu de la plej rimarkindaj elementoj de la flamenko—arto. Unamuno vidis en la vorto gitaro la kripligon de la greka vorto *kithara*. Ĝenerale oni supozas orientan, sed ne precizan originon de la gitaro. Inter la andaluzoj de araba deveno estis ofte uzata la esprimo *alquitara*, kiu originas de la araba *qitara*, siaflanke venanta el la greka kaj samsonante kun *ĉitara* (citro). Zirjab, la muzikisto de la omajada emirato, kiu ankau alportis la ŝakludon al Europo, opiniis, ke la gitaro havas persan originon. Kiel ajn, la gitaro estas ĉiukaze unu el la arabaj kontribuoj al la andaluza liriko.

La gitaro estas la plej trafa bildigo de la animo andaluza; ĝi estas la konscio, en kiu reflektiĝas la sensiva maura animo kaj en kiu ĝi reekkonas sin.

Andrés Segovia ekz. estos ĉiam grandioza artisto, sed li neniam kapablos elvoki tian animo—staton ĉe la andaluzoj kiel la cigana flamenkogitaristoj Montoya au "Habichuela".

La gitaro signifas ardan pasion, sentimenton, intuicion; ĝi estas la kontraŭo de virtuoza tekniko au de saĝa racieco.

Ĝi ĝuste tiregas iun kun si au ne; ĝi entuziasmigas la sentimentojn au lasas iun netuŝita; ĝi ne bezonas konvinki. Kiam post la ludado iu ravito spontanee elkrias: "Tio ĉi estas, certe kaj sendube, Señor" – tiam tiu elkrio neniam signifas "Vi konvinkis min", sed "Ĉi tiuj viaj sentimentoj estas ekzakte ankau la miaj".

La individua maniero, partopreni la andaluzan vivon kaj konsenti en ĝi kun aliaj, montriĝas en la stilo de la gitaristo; ĉiu unuopa posedas sian personan kaj tute ne-imiteblan stilon, kiu jam ĉeestas kun la agordo de la gitaro.

Ĉe la ludo oni distingas tri teknikojn:

la arpeĝado (*rasgueo*): antauludo kun diversaj motivoj, la plukado (*punteado*): fiksado de la melodia strukturo, la ornamado (*falseta*): persona maniero, estetike prilabori la melodion per kapricaj arabeskoj kaj aldona filigrano, la esenca celo de la muzika procedo.

La gitaro estas ankau la morala konscio de Andaluzio: en ĝi kuŝas la angoroj, la revoj, la penoj kaj la skrupuloj, sed neniam la ĝojoj. La gitaro andaluza ne scias ridi, ĉar ju pli trista des pli andaluza ĝi estas, kaj

"Estas maleble silentigi ĝin,
 ĝi ploras monotone kiel ploras la akvo,
 kiel la vento muĝas en la neĝoŝtormo
 ĝi ploras pri malatingeblaj deziroj."

Federico G. Lorca "El poema del cante jondo"

La gitaro estas esprimo de sensiveco kaj tenereco andaluza. Ĝi estas supersensiva je kareso, estas feminina kaj ŝaumiĝanta de sovaĝa pasio, se la vira mano tuŝas ĝian korpon en la intenco de la malsanktigo. Ĝi havas la rondaĵojn kaj la talion virinajn, streĉitajn nervojn, kiuj lamentas au muĝas lau interna koncepto de la kaptado, kies sekreton konas nur la amanto. La gitaro estas kiel petega animo inter ĝiaj dormantaj kordoj kaj kiel malferma korpo, kiel tremanta kaj virgula sino.

Iu *fadanguillo* diras, ke la gitaro estas dormanta amantino. La andaluzoj posedas en la gitaro fianĉinon, kiu obsedata de ŝia vira kunludanto naskas la kanton. Pro tio la brakumo fare de la amanta viro kaj gitaristo estas ĉiam seksa esprimo, kiu sublimiĝas en arto.

La kastanjetoj

Alia grava elemento de la flamenko estas la kastanjetoj. Lau iuj opinioj ili havas autoĥtonan tartessan originon kaj estis disvastigitaj en la oriento per la plej fruaj loĝantoj de Cádiz. Lau la supozoj de aliaj ili devenas el Kreto, Bizanco, Persio au de la ciganoj. Multe pli verŝajne ili originas el Egiptio.

Tio estas la opinio de la kastanjeto-specialisto, la advokato Francisco Agustín Florencio, pseudonimo de Fray Juan Fernández de Rojas. En unu el siaj verkoj li

priskribas, ke la kastanjetoj ĉe la egiptoj estis sankta instrumento, dediĉita al Nilo, ludita de la muzo Plulis kaj figurita en la statuo de la Isis kiel konsekrita signo malsupre la serpento. La historiistoj Strabon kaj Italicus asertas, ke la hispanoj pere de kulta danco omaĝas nekonatan diinon, pri kiu kelkaj opinias, ke estas Isis, aliaj ke estas Heraklo (Herkulo), dio adorita de la enloĝantoj de Cádiz.

La *Cante*

La *Cante* estas eble la kultura esprimaĵo, kiu plej bone karakterizas Andaluzion kaj la andaluzojn.

Ni distingas tri specojn de *cantes*: la *Cante jondo*, la profunda, la *Cante flamenco* kaj la *Cante gitano*; ili reprezentas tri diversajn aspektojn kun unu komuna origino. La esenca diferenco inter la *Cante jondo* kaj la *Cante flamenco* ekzistas en tio, ke la *Cante flamenco* estas la kulturita, dogmigita kaj certagrade universitata formo de la *Cante jondo*; ĝi estas la ĝardeno kompare al arbaro, la racio kompare al la sentimento.

La *Cante jondo* intencas esprimi tion, kion diras la delikatsenta pramisto de la infanto Arnoldo en malnova hispana romano:

"Mi rivelacias mian kanton nur al tiu, kiu montriĝas inklina kune iri kun mi."

La genia kreinto de la *Cante jondo* estis la plej originala kaj la plej lerta artisto en tiu epoko. Li nomis sin Zirjab lau la nomo de birdo—speco. Li venis al Cordoba en la tempo de Abd' ar—Rahman II., kaj li estis homo kiu parkere sciis 10000 kantojn. Li havis la intuicion, ke ekzistas nur unusola registro de voĉo kiu kapablas esprimi la tutan doloron en la *Cante jondo*, kaj li estis la unua, kiu ordonis al siaj disĉiploj ekzerci tiun voĉon sidigante ilin sur tabureton por ekkrii "ja hadjan" au simple nur longdaŭran "aaa".

Tiu kontinua aaa, la hodiaŭa lamenta "ay", kiu rolas kiel antauludo de la doloro, havis lau Zirjab la pedagogian celon, kantemigi la voĉon kaj varmigi ĝin por arda strofo.

Ekzistas kelkaj, kiuj asertas — kvazau kiel ŝercema imago, ke la komenca "ay" ekestu kiel dolorkriego ĉe la frakturo de brako, eligita fare de kamelpelanto en la dezerto.

Ankau la religie destinita juda influo helpis elformi la *Cante jondo*. Tiel opinias la historiisto Medina Azara, ke la originala maniero de la *Cante jondo* devus esti tiua, kiun la izraelioj ekkantis ĉe la ekvido de sia unua detruita templo. Kiel pruvon li mencias jenan dolorkrion, kiu estas destinita por la festtagoj, kaj festtago nomiĝas en la hebrea "jomtob" (kiu signifas laŭvorte "bonan tagon"), sed en la populara uzo sonas kiel "jondo". Fakte ekzistas tri kantoj, kiuj surprize similas al la dua de la sinagogo—psalmoj, nome la *Saeta*, la *Fandanguillo* kaj la *Seguidilla gitana*.

Iagrade kiel tria kontribua elemento al la vorto "flamenko" alvenas lau Blas Infante la araba duoplo—vorto *felah—mengu*, kiu signifas "fuĝinta kamparano" kaj rilatiĝas al la ciganoj, ĉar oni supozis, ke ili devenas de la forpelitaj mauroj. Sed la ciganoj alvenis al Andaluzio nur en 1449.

La andaluza kulturo respegulas ĉiujn tiujn menciitajn influojn kaj kunfandas ilin, sed oni povas tamen reekkoni en ĝi la cititajn tri statojn de la animo:

- la araban individualismo,
- la mutan ciganan ribelon kaj
- la dolorplenan judan religiecon.

Pro tio la *Cante jondo*, la *Cante flamenco* kaj la *Cante gitano* estas origine identaj, ĉar ĝi estis nomita flanke de la judoj *jondo*, sed en la tempo de Carlos V. *flamenco* = flandra, ĉar oni supozis ĝin veninta el Flandrujo au de la forpelitaj mauraj kamparanoj = felahoj; *gitano* ĝi estis nomita por aludi, ke la ciganoj estis tiuj, kiuj revivigis kaj stimulis la arkaikajn formojn de la *Cante jondo* per novaj, fortaj impulsoj.

Ekzistas nun iuj melodiaj variantoj de la *Cante* kun respektive diversaj propraj formoj. La *Cante gitano* kiel plej reduktita formo kaj kun la esprimo de la plej grava doloro estas eble la plej originala speco memoriganta al la afrikana popolmuziko de la sklavo—kantoj, el kiuj ekestis la "blues".

La *Cante jondo*, plena de esprimoj de penado kaj

religieco memorigas al la psalmoj. La *Cante flamenco* estas la plej fajngita kaj malsovaĝigita, kiu brilas por la reprezentado; sed tiurilate ĝi estas la *cante* la plej fremdigita de la praformo.

La diversajn *Cantes* ni povas dividi jene:

- *Fandango*, *Media granaína*, *Rondeñas*, *Malagueñas* kaj *Tarantas* estas de maura naturo,
- *Liviana*, *Martinete*, *Alegrías*, *Bulerías* kaj *Seguidillas* originas de la ciganoj,
- *Saeta*, *Soleares* kaj *Tientos* estas de juda deveno,
- *Petenera*, *Fandango*, *Marianas* kaj *Cartageneras* estas fajngitaj formoj kaj apartenas al la flamenko.

La *Cante jondo* agis fekundiga kaj disvastiĝis trans la nacian kadron, transpasis la atlantikon kaj transformiĝis en la tropikajn, florajn variantojn de la *Guajiras*, *Milongas* kaj *Colombianas*, en ia grado bastardaj idoj, kiuj pleje malproksimiĝis de la flamenko.

Tiuj konsideroj pri la flamenko finiĝu kun la konstato, ke Andaluzio kaj la andaluzoj ĝis hodiaŭ ne ŝanĝis la vivstilon; ne povinte ŝanĝi la vivkondiĉojn ili aktualigis la tragedion de la lando kaj de la senespero per la kantoj.

Je la fino estu prezentataj kelkaj tekstoj de tiuj *Cantes*, el kiuj elsonas la amasiĝinta peno de jarcentoj:

"Kiu deziras kanti bone
kantu kiam li suferas penon,
tiu peno devigas lin kanti
bone eĉ se li ne volas.

Peno kaj kio ne estas peno,
ĉio estas por mi penplena,
hierau mi suferis ke mi povu cin vidi
hodiau mi pasias ĉar mi ne vidis cin."

(*Petenera*)

Andaluzio kantis kontraŭ la disdivido en klasoj:

"Eĉ en la arbaro ĉiu arbo
estas alordigita al klaso,
el la ligno de unu estiĝos skulptaĵoj,
la ligno de alia servas al lignokarbo."

(*Malagueña*)

Andaluzio kantis kontraŭ la socia maljusteco:

"Muelisto, kial vi muelas
la tritikon tiel zorgeme,
vi do nur preparas la farunon
kaj aliaj manĝas vian panon ŝteleme."

(....)

"Min demandis juĝisto,
per kio mi nutras min,
kaj mi respondis: ŝtelante
kiel estas la kutimo de via moŝto –
mi tamen ne rabas tiom."

(*Fandanguillo*)

Andaluzio ĉiam prikantis la liberecon por ĉiuj:

"Andaluzoj, levu vin, postulu kampojn kaj
liberecon, vi pluvivu por liberigota Andaluzio,
Hispanio kaj Homaro".

POPOLO KIU KANTAS ESTAS
POPOLO PLUVIVONTA.

Prelego farita dum la aranĝo "Historia del Flamenco"
la 26-an de novembro 1992 en Zuriko.

Adreso de la aŭtoro:
Emilio Moreno
Kanzleistr. 224,
CH 8004 Zürich.